



AMERIKA ESPERANTISTO

JANUARY, 1919



OFFICIAL ORGAN OF
THE ESPERANTO ASSOCIATION
OF NORTH AMERICA

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

MRS. I. M. HORN

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8:00.—Meetings Wednesday evenings. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo: L. D. Stockton, Sec. & Treas., 438 15th St. 19

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Third Friday eve., Rm. 315 Lick Bldg., 35 Montgomery St. Fino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Av.

BRIDGEPORT, CONN.

Bridgeport Esperanto Society meets every Friday at 7:30 P.M. At 284 Dover St., near Remington Arms. S-ro Gustavus McGroarty Sek., 525 Fairfield Av. Marcus L. DeVine, Pres., 284 Dover St. Visiting Esperantists call Barnum 1294-Ring 13. 19

WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanta Klubo, 1389 Quincy St., Kunvenas Jaudon vespere. 19

CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y, 1116 W. 19th Place. La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2am kaj 4am sab. ĉiunomate. 19

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8:00 P.M.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg. Miss M. G. Ingalls, Sec'y, The Windsor, State St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8:10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, B. Lendo, Sek., 120 29th St.

PLAINVIEW, NEBR.

Esperanto-Fako de la "Sola Skolto" (Lone Scout), 500 N. Dearborn, Chicago, Ill. (Revuo per la Junularo. Organizu grupon inter la geknaboj. Granda sukceso. Abonu tuj! Jare .75; Kvarmonate .25.)

Fakestro, Chas. P. Lang, Plainview, Nebr.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

MANCHESTER, N. H.

Pionira Grupo. Sek., Daisy E. Flanders, 714 Beech St. 19

HOBOKEN, N. J.

"J.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8:30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

BUFFALO, N. Y.

Buffalo Esperanto Society, A. E. Warren, Pres.; Miss Ray Morris, Sec.; meets Thursday evenings at 60 High St. 19

NEW YORK CITY, N. Y.

The Greater New York Esperanto Society, including all chartered clubs in Manhattan, The Bronx, Brooklyn, Queens, Richmond, Long Island, Westchester County and the New Jersey suburbs, Miss Leonora Stoepler, Sec., 105 W. 94th St.

The New York Barco, or Esperanto supper, is held on the THIRD FRIDAY of every month (6:30 P. M.), Hotel Albert, Cor. 11th St. and University Place, near Broadway surface car; Subway 8th and 14th Sts.

La diman kunveno, al kiu ĉiu estas bonvenata, okazas je la tria horo, posttagmezo, ĉiun dimanĉn. de la loko de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

PHILADELPHIA, PA.

Philia Esp. Soc. J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Bingham Hotel, 11th and Market Sts.

Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 New York Ave. 19

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec. Academy of Science and Art. James McKirdy, Sec., Box 920. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists. S.-ino B. H. Kerner, Sek., 632 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)
WEST NEWTON, MASS.

One Dollar a Year.

Single Copy Ten Cents.

VOL. 23

JANUARY, 1919

NO. 5

GRAVAJ STATDOKUMENTOJ

KONDICOJ DE MILITPAUZO KUN GERMANUJO

Kiel Prezentitaj al la Usona Kongreso per Prezidanto Wilson
11 Novembro, 1918

Sinjoroj Kongresanoj:

En ĉi tiuj maltrankvilaj tempoj de rapida kaj grandega ŝanĝado faciligos iom mian senton pri respondeco, se mi plenumos persone la devon komuniki al vi kelkajn el la pli gravaj cirkonstancoj de la situacio, kiun necesas pritrakti.

La germanaj estroj, kiuj laŭinvite de la Plej Alta Militkoncilio komunikigadis kun Marŝalo Foch, jam akceptis kaj subskribis la kondiĉojn de militpaŭzo, kiujn oni rajtigis kaj ordonis al li komuniki al ili. Tiuj kondiĉoj estas jenaj:

I. Militaj Klaŭzoj pri Okcidenta Fronto

1. Ĉeso de l' operacioj surteraj kaj enaeraj ses horojn post subskribo al la militpaŭzo.

2. Tuja malokupo de l' invaditaj landoj: Belgujo, Francujo, Al-sace-Lorraine, Luxembourg, tiel arangota, ke ĝi estos finita ĝis dekkvar tagoj depost subskribo al la militpaŭzo. Germanaj trupoj, kiuj ne estos forlasintaj la supre diritajn teritoriojn en la templimo, farigos militkaptitoj. Okupado per la kunfarto de la Liganoj kaj Usono progresados egale kun la malokupado en tiuj regionoj. Ciuj movoj de malokupado kaj okupado gvidos sin laŭ nito aldejita al ĉi tiuj kondiĉoj.

3. Hejmen sendado, tuj komencata kaj finota ĝis dekkvar tagoj,

de ĉiuj logantoj de la landoj supre diritaj, inkluzive garantiulojn kaj jugotojn aŭ kondamnitojn.

4. Cedo en bona stato per la germanaj armeoj de la jena ekipajo: 5000 kanonoj (2500 pezaj, 2500 kampaj), 30,000 mašinapiloj, 3000 "minenwerfer," 2000 aeroplanoj (batalaj, bombuzaj—unue D.—73'oj kaj nokte-bombomašinoj). La supraj estu transdonataj en Simmstu al la Liganaj kaj Usonaj trupoj laŭ la detalaj instrukcioj metitaj en la aldonitan noton.

5. Malokupo per la germanaj armeoj de la landoj maldekstraborde de la Rhein. Tiujn landojn maldekstraborde de la Rhein administras la lokaj registaroj sub kontrolo de la Liganaj kaj Usonaj armeoj de okupado. Okupo de tiuj teritorioj plenumiĝos per tio, ke Liganaj kaj Usonaj garnizonoj tenos la ĉefajn transirejojn de la Rhein: Mainz, Koblenz, Koeln, kune kun pontokapojoj ĉe tiuj punktoj en 30-kilometra distanco sur dekstra bordo, kaj ke garnizonoj simile tenos la strategiajn lokojn de la regionoj. Zono neŭtrala estos rezervata dekstre de la Rhein inter la rivero kaj linio strekota paralele kun ĝi kvardek kilometrojn oriente, de la landlimo de Holando ĝis la paralelo Gernsheim, kaj kiom eble 30-kilometran distancon oriente de la rivero de la Rhein-landoj estos tiel aranĝata, ke ĝi finiĝos ĝis plua daŭro de dekunu tagoj, sume deknaŭ tagoj post subskribo al la militpaŭzo. Ĉiuj movoj de malokupado kaj okupado sin gvidos laŭ la aldonita nota.

6. En la tuta teritorio malokupata de la malamiko oni nenie malokupigu la logantojn; oni neniel aji difektu la personojn aŭ proprajon de la logantoj. Oni nenion neniel detruu. La militaj establaj ĉiuspecaj estu transdonataj sendifekte, kiel ankaŭ la militaj mangoprovizoj, militiloj, ekipajo, ne forigitaj en la templimo de la malokupado. La mangoprovizoj ĉiuspecaj por la civila logantaro, la brutoj, ktp., estu lasataj "in situ." La industriajn establajn oni neniel difektu, nek ilian personaron forigu. La vojojn kaj komunikilojn ĉiuspecaj: fervojojn, akvovojojn, soseojn, pontojn, telegrafojn, telefonojn oni neniel difektu.

7. La tuta civila kaj militista personaro, nun dungata ĉe ili, restu. 5000 lokomotivoj, 50,000 ŝarĝveturiloj kaj 10,000 ŝarĝaŭtomobilioj bone funkciantaj, kun siaj nece:aj ekstraj eroj kaj akcesorajoj, estu transdonataj al la Kunligitaj Ŝtataj en la templimo de la malokupado de Belgujo kaj Luxembourg. La fervojoj de Alsace-Lorraine estu transdonataj en la sama tempo, kune kun ĉiuj antaŭ-militaj personaroj kaj materialoj. Kaj la materialoj necesaj por funkciigi la fervojojn en la regiono maldekstraborde de la Rhein lasiĝu "in situ." Ĉiuj karboprovizoj kaj materialoj por konservado de la konstantaj vojoj, ĉiuj signaloj kaj riparejoj lasiĝu tutaj "in situ" kaj zorgu Germanujo pri ilia efikeco dum la tuta daŭro de la militpaŭzo. Ĉi-aldonita noto fiksas la detalojn de tiuj procedoj.

8. La germana militestraro havos la respondecon elmontri ĉiujn minojn aŭ malrapid-fuzajojn, distriktajn tra la teritorio malokupata de la germanaj trupoj, kaj helpos ilin eltrovi kaj detru. La germana militestraro ankaŭ sciigu, se ĝi uzis detru-rimedojn, ekzemple venenadon de fontoj, putoj, ktp., sub puno de revengajo.

9. La rekvizrajton profitos la Liganaj kaj Usonaj armeoj en ĉiuj okupataj regionoj. La vivtenadon de la trupoj de okupado en la

Rheinlando (esceptinte Alsace-Lorraine) oni alkalkulos al la germana registaro.

10. Tuja hejmen resendo, sen reciprokado, laŭ detalaj kondiĉoj difinotaj, de ĉiuj Liganaj kaj Usonaj militkaptitoj. La Liganaj kaj Usono povos disponi tiujn kaptitojn laŭvole.

11. Malsanaj kaj vunditaj ne forporteblaj el la malokupata teritorio estos prizorgataj de germana personaro, kiu restos sur la loko kun la bezonaj kuracajoj.

II. Procedoj Rilate al la Orientaj Landlimoj de Germanujo.

12. Ĉiuj germanaj trupoj nun en ĉia teritorio, kiu antaŭ la milito apartenis al Rusujo, Rumanujo aŭ Turkujo, retririĝos en la landlimojn de Germanujo, kiaj ili ekzistis la unuan de Aŭgusto, 1914.

13. Malokupado de la germanaj trupoj komencigū tuj, kaj ĉiuj germanaj instruantoj, kaptitoj, kaj civilaj kiel ankaŭ militistaj agentoj nun sur la rusa teritorio (kiel difinita antaŭ 1914) estu revokataj.

14. La germanaj trupoj tuj ĉesu ĉiajn rekvizojn kaj kaptojn kaj ceterajn entreprenojn kun celo havigi provizojn por Germanujo el Rumanujo kaj Rusujo (kiel difinitaj la unuan de Aŭgusto, 1914).

15. Forlaso de la traktatoj de Bucuresti kaj Brest-Litovsk kaj de ĉiuj aldonaj traktatoj.

16. La Liganoj povu libere eniradi la teritoriojn malokupatajn de la germanoj ĉe ilia orienta landlimo, aŭ per Danzig aŭ per la Vistula, por transporti provizojn al la logantaroj de tiuj teritorioj aŭ por ĉia alia celo.

III. Klaŭzo Koncerne Orientan Afrikon

17. Senkondiĉa kapitulaco de ĉiuj germanaj fortoj operaciantaj en Orienta Afriko ĝis unu monato.

IV. Klaŭzoj Generalaj

18. Hejmen resendo, sen reciprokado, en maksimuma daŭro de unu monato, laŭ detalaj kondiĉoj ĉi-poste farotaj, de ĉiuj civiluloj internigitaj aŭ ekzilitaj, kiuj estus civitanoj de aliaj Liganaj aŭ Asociitaj Statoj ol la cititaj en klaŭzo 3, paragrafo 19, kun la rezervo, ke eventualaj postaj pretendoj kaj postuloj de la Liganoj kaj Usono restos netuŝitaj.

19. La jenajn financajn kondiĉojn oni postulas: Kompensadon por la difektoj faritaj. En la daŭro de ĉi tiu militpaŭzo la malamiko ne forigu publikajn kreditajojn, kiuj povas garantii al la Liganoj repagon aŭ rebonigon de la militperdoj. Oni tuj redonu la kontantajn deponajojn en la Nacian Bankon de Belgujo, kaj ĝenerale oni resendu tuj ĉiujn dokumentojn, metalmonon, obligaciojn, akciojn, papermonon, kune kun la ilaro por ilia fabrikado, rilate al publikaj aŭ privataj interesoj en la invaditaj landoj. Oni redonu la rusan kaj rumanan oron ceditan al Germanujo aŭ prenitan de tiu ŝtatapotenco. Tiun oron oni konfidu al la Liganoj ĝis subskribo al la paco.

V. Kondiĉoj Maraj

20. Tuja ĉeso de ĉiuj malamikagoj surmare kaj precizaj informoj pri la kieo kaj movoj de ĉiuj germanaj ŝipoj. Oni sciigu la neŭtralajn naciojn, ke oni permesas liberan navigadon en ĉiuj teritoriaj akvoj al la militaj kaj komercaj ŝiparoj de la Liganaj kaj Asociitaj Ŝtataj Ŝtatoj, ĉiujn demandojn de neŭtraleco forlasante.

21. Ĉiujn milit- kaj komercciparajn militkaptitojn de la Liganaj

kaj Asociitaj Statpotencoj en germanaj manoj oni resendu, sen reciprokado.

22. Cedo al la Liganoj kaj Usono de 160 germanaj submariſipoj (inkluzive ĉiujn submarajn kroziſipojn kaj minmetajn submariſipojn) kun ilia plena armilaro kaj ekipajo en havenojn de la Liganoj kaj Usono. Ĉiujn ceterajn submariſipojn oni senanigos kaj plene senarmigos kaj metos sub kontrolon de la Ligpotencoj kaj Usono.

23. Jenaj germanaj marsuprajaj militiſipoj, nomotaj de Liganoj kaj Usono, estu tuj senarmigataj kaj poste internigataj en havenojn neŭtralajn, aŭ, se tiaj mankos, en havenojn Liganojn, nomotajn de la Liganoj kaj Usono, kaj restu sur la ŝipoj nur zorgantoj: ses batal-kroziſipoj, dek bataliſipoj, ok malpezaj kroziſipoj (inter ili du min-iſipoj), kvindek detruiſipoj de la plej moderna tipo. Ĉiuj ceteraj marsuprajaj militiſipoj (inkluzive la riverajn) estu koncentrataj en germanajn marbazojn nomotajn de la Liganoj kaj Usono, kaj estu senanigataj kaj plene senarmigataj kaj metataj sub kontrolon de la Liganoj kaj Usono. Ĉiujn unuojn de la helpiſaro (skrapretbarkojn, aŭto-boatojn, ktp.) oni senarmigu.

24. La Liganoj kaj Usono rajtos forigi ĉiujn minarojn kaj obstrukcojn metitajn de Germanujo ekster la germanaj akvoj, kaj iliajn lokojn oni sciigu.

25. Liberan navigadon de la Balta Maro oni permesu al la militaj kaj komercaj ŝiparoj de la Liganoj kaj Asociitaj Statpotencoj. Tiu-cele la Liganoj kaj Usono rajtiĝos okupi ĉiujn germanajn fortikojn, fortikajojn, bateriojn kaj ĉiajn defendejaĵojn en ĉiuj enirejoj el la Kattegat en la Baltan Maron, kaj forigi ĉiujn minojn kaj obstrukcojn en kaj ekster la germanaj akvoj sen ĉia pretendado pri neŭtraleco, kaj la lokojn de ĉiuj tiaj minoj kaj obstrukcoj oni sciigos.

26. I a nunaj blokadcirkonstancoj, starigitaj de la Liganoj kaj Asociitaj Statpotencoj, restos sensanĝe, kaj ĉiuj germanaj komerciipoj troviĝontaj surmare restos kapereblaj.

27. Ĉiuj maraj aerveturiloj estu koncentrataj kaj malmobilizataj en germanaj bazoj nomotaj de la Liganoj kaj Usono.

28. Malokupante la belgajn marbordojn kaj havenojn, Germanujo forlasu ĉiujn komerciipojn, treniſipetojn, ŝarĝbarkojn, arganojn kaj ĉiujn ceterajn havenmaterialojn, ĉiujn materialojn por enlanda navigado, ĉiujn aerveturilojn kaj ĉiujn provizojn kaj aparatojn ĉiuspecajn.

29. Ĉiujn havenojn de la Nigra Maro malokupu Germanujo; ĉiuj rusaj militiſipoj ciuspecaj, kaperitaj de Germanujo en la Nigra Maro, estu transdonataj al la Liganoj kaj Usono; ĉiuj kaperitaj komerciipoj estu liberigataj; ĉiuj militaj kaj alispecaj materialoj, kaptitaj en tiuj havenoj, estu redonataj kaj la germanaj materialoj nomitaj en klaŭzo 28 estu forlasataj.

30. Ĉiuj komercaj ŝipoj en germanaj manoj, apartenantaj al la Liganoj kaj Asociitaj Statpotencoj, estu resendataj en havenojn nomotajn de la Liganoj kaj Usono, sen reciprokado.

31. Nenian detruon de ŝipoj aŭ materialoj oni permesos antaŭ malokupo, cedo aŭ redono.

32. La Germana Registro formale sciigu la neŭtralajn Registrojn de la mondo, kaj aparte la Registrojn de Norvegujo, Svedujo, Danujo kaj Holando, ke ĉiuj limigoj pri komercado de iliaj ŝipoj kun

la Liganaj aŭ Asociitaj Landoj, ĉu faritaj de la Germana Registro aŭ de privataj germanaj interesoj, kaj ĉu kompense por specialaj koncesioj (ekzemple eksportado de ŝipfaraj materialoj) aŭ ne, estas tuj nuligataj.

33. Neniujn ajan germanajn komercipojn oni alinaciigu sub neŭtralan flagon post subskribo al la militpaŭzo.

VI. Daŭro de Militpaŭzo

34. La daŭro de la militpaŭzo estas tridek tagoj, kun rajto ĝin plilongigi. En tiu periodo, se oni ne plenumos kiun ajan el la supraj klaŭzoj, la militpaŭzo estas nuligebla de unu el la traktantaj partoj, post avizo kvardek du horojn antaŭe.

VII. Templimo por Respondo.

35. Tiun militpaŭzon akceptos aŭ malakceptos Germanujo ĝis sepdek du horoj post la komuniko.

La milito do finiĝas; ĉar, akceptinte tiujn kondiĉojn de militpaŭzo, la germana estraro remiliti ne povos.

Ankoraŭ ne eble estas taksi la sekvojn de tiu granda finalo. Ni scias nur, ke tiu tragedia milito, kies konsumantaj flamoj flugis de nacio al nacio, ĝis la tuta mondo ekbrulis,—ke tiu milito cesis, kaj ke nia propra popolo havis la privilegion eniri ĝin en ĝia plej kriza tempo tiamaniere kaj kun tia forto, kiu, profunde fierigante nin, kунhelpis al la granda rezultato. Ni scias ankaŭ, ke la celo de la milito estas atingita—la celo volegita de ĉiuj liberuloj; kaj atingita ĝi estas en absoluta pleneco, kiun ec nun ni ankorā ne komprenas. La armita imperialismo, kian konceptis la nur hieraŭ mastroj de Germanujo, jam formortis; ĝiaj kontraŭlegaj ambicioj dronas en nigra fiasko. Kiu nun penos ĝin revivigi? La arbitra potenco de la milita kasto de Germanujo, kiu iam povis sekrete kaj propramove ĝeni la mondan pacon, jam estas senkreditigita kaj detruita. Kaj pli ol tio—multe pli ol tio—estas elfarite. La grandaj nacioj, kiuj kunligis sin por detru ĝin, jam formale unuiĝis en la komuna intenco starigi tian pacon, kia kontentigas la tutmondajn sapirojn al neprofitema justeco, korpigota en arangojn, kiuj sin bazos sur ion multe pli bonan kaj multe pli daŭran, ol la egoismaj konkurinteresoj de potencaj ŝtatoj. Oni ne plu konjektadas pri tio, kiajn aferojn la venkintoj volas. Al tiuj aferoj ili dediĉis ne nur la intelekton, sed la koron. Ilia konfesita kaj kuna intenco estas kontentigi kaj ŝirmi la malfortajn, kaj ne simple doni justajn rajtojn al la fortaj.

La humana tendenco kaj celo de la triumfintaj registroj jam montriĝis en maniero tre praktika. Iliaj reprezentantoj en la Plej Alta Militkonsilo ĉe Versailles per unuvoĉa deziresprimo certigis la popolojn de la Centraj Imperioj, ke ĉio ebla en la cirkonstancoj estos farata, por liveradi al ili nutraĵon kaj malegigi la teruran senecon, kiu en tiom da lokoj minacas ĉi ilian vivon; kaj oni klopodos tuj organizi tiujn helponojn same sisteme, kiel ili organiziĝis en la okazo de Belgujo. Uzante la senokupan ŝiparon de la Centraj Imperioj, ŝajnas, ke oni sufice baldaŭ povos forpeli de iliaj premataj loĝantaroj la timon pri mizerego, kaj liberigi iliajn spiriton kaj fortojn por la grandaj kaj dangeraj taskoj de politika rekonstruado, kiuj cirkauas ilin je ĉiuj flanko. La malsato ne naskas reformojn; ĝi naskas frenezecon kaj ĉiujn kriantajn malsanojn, kiuj ordan vivon neebligas.

Car kun falo de l' antikvaj regsistemoj, kiuj inkube pezis sur la popoloj de la Centraj Imperioj, venis politika ne simple ŝango, sed revolucio; kaj revolucio, kiu ŝajnas ankoraŭ ne ricevinta definitivon ordan formon, sed fluanta de ŝango al ŝango, ĝis la pensemaj homoj devas demandi sin: Kun kiuj kaj kiaj ŝtatoj ni estas traktontaj, farante la interligojn de paco? Kun kia aŭtoritato ili renkontos nin, kaj kun kia garantio, ke ilia aŭtoritato postvivos kaj sekure subtenos la internaciajn aranĝojn de ni starigotajn? Jen problemo sufice dubiga kaj maltrankviliga. La paco farota sur kies promesoj kaj garantioj sin bazos?

Tutे honestaj kun ni, ni konfesu, ke je tiuj demandoj respondo kontentiga ekzistas ne nun aŭ tuj. Sed tio ne malesperigu nin pri baldiaŭa respondo sufici. Tio nur instruu al ni paciencon kaj helpemecon, kaj ke ni memoru antaŭ ĉio la grandajn esperon kaj konfidon, kiuj subkuſas la okazantajojn. Ekscesoj nenion atingas. Tion abunde pruvis la freſdataj spertoj de malfeliĉa Rusujo. Malordoj maltrafas ĉian celon. Se ekscesoj okazus, se malordoj kelkatempe ekaperus, sekvos poste seriozaj pripensoj kaj tago de konstrua agado, kondiĉe ke ni helpos kaj ne malhelpos.

La nunajo en tuto apartenas al la nacioj kaj la popoloj, kiuj konserveras sian egalpezon kaj la ordajn procedojn de siaj regadoj; la estontajo apartenas al tiuj, kiuj pruvas sin la veraj amikoj de la homaro. Venki per bataliloj estas venki nur kelkatempe; venki la mondon akirante ĝian estimon estas fari venkon por ĉiam. Mi estas certa, ke la nacioj profitintaj la disciplinon de la libereco kaj donintaj sin kvieta al ĝia orda praktikado estas jam venkontaj la mondon per la simpla forto de bonekzemplo kaj de amika helpemeco.

La popoloj, nur jus eligintaj el sub la jugo de arbitra regado kaj jam fine heredantaj sian liberecon, neniam trovos la trezorojn de la libereco, kiujn ili celas, se ili serĉos ilin per lumo de torĉo. Ili trovos, ke ĉiu vojo makulita per la sango de iliaj propraj fratoj kondukas al dezerto, sed ne al la celo de iliaj esperoj. Ili jam staras vizago kontraŭ vizago kun sia unua provo. Ni tenu firme la lumon, ĝis ili sin orientos. Kaj dum, se estas eble, ni devas starigi pacon, kiu juste difinos ilian lokon inter la nacioj, forigos ĉian timon pri iliaj najbaroj kaj pri iliaj antaŭaj mastroj, kaj povigas ilin vivadi sekure kaj kontente, post kiam ili ordigas siajn proprajn aferojn. Mi mem ne dubas ilian intencion aŭ ilian kapablecon. Eksistas kelke da favoraj signoj, ke ili konas kaj elektos la vojojn de kvieta kaj paci adaptado. Se jes, ni ĉiel-eble disponigu al ili nian helpon. Se ne, ni devos atendi kun pacienco kaj simpatio la vekiĝon kaj resaniĝon, kiuj nepre venos en la fino.

[Postaj diskutadoj iom ŝanĝis paragrafojn 7, 12, 16, 17, 18, 22, 23, 26 kaj 35.—Red.]

ATENTU ALILINGVANOJ

Šajnas al ni tre dezirinde aŭdi el aliaj landoj novajn opiniojn, tial ni proponas tion ĉi: al iu ne-usona ne-angla-lingvo-parolantulo kiu donacos esperantan artikolon de almenaŭ du paĝoj (presitaj) kiun ni akceptos **kaj presos**, ni donacos jaran abonon al Amerika Esperantisto komencante kun eldono de l'artikolon. Precipe ni ĝojus aŭdi el Rusujo, Persujo, kaj flinujo.

December 11. The following resolution was sent by President Payson in the name of the society to the American peace delegation:

Resolved: That the Esperanto Association of North America call upon the American delegation to advocate the use of the Esperanto language for one of the official texts of the peace treaty, and of the documents constituting a league of nations.

**MEMORIGAJ SERVOJ JE NASKOTAGO DE
DOKTORO LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF**

Washington

Oni memorigis la naskotagon de D-ro Zamenhof ĉe salonego de la Virina Kristen-Modereca Unuigo, en Vašingtono, Distrikto de Kolumbio, je posttagmezo de 15a decembro 1918. Estis ĉirkaŭ 40 ĉees-tantoj, preskaŭ ĉiuj esperantistoj.

Post kelkaj enkondukaj vortoj de S-ro B. Pickman Mann, kiu prezidis, la horo kantis la "Preĝo" verkitan esperante de S-ro H. I. Keyes, de Uniontown, Pennsylvanio, kaj presitan en Amerika Esperantisto.

Tiam S-ro Mann faris mallongan skizon de la vivado de D-ro Zamenhof; S-ro H. A. Babcock parolis pri la progreso de Esperanto ĉe anglalingvaj landoj; S-ro W. E. Baff pri ĝia progreso ĉe germanaj, holandaj kaj skandinavaj landoj; F-no Amy C. Leavitt pri ĝia uzado dum la milito; kaj Sub-Kolonelo F. A. Postnikov pri ĝia progreso ĉe rusaj, balkanaj kaj aziaj landoj.

La horo tiam kantis la tradukajon de "Ameriko" verkitan de Rev. A. Krafft.

S-ro N. S. Guimont parolis pri la estonta stato de Esperanto ĉe la latinlingvaj landoj de Eŭropo; S-ro W. E. Baff pri la taŭgeco de Esperanto por diplomaciaj, sciencaj kaj profesiaj celoj; kaj S-ro John A. Shiel, distrikta delegito de la Universala Esperanto-Asocio, pri la agadoj de tiu asocio dum la pasintaj kvar jaroj.

La horo tiam kantis "La Espero" de D-ro Zamenhof.

La servo estis kondukata esperante, ĉiu frazo tradukiĝanta angle kiam dirata. La paroladoj estis ĉiuj angle dirataj krom parto de tiu de S-ro Guimont.

La akompanajoj de la himnoj estis muzikataj forte-piane de F-ino Amy C. Leavitt.

New York

Miss Butler gave the opening address on The Future of Esperanto.

Mr. Fisher said we must guard against the tendency to make English the international language, which would be a handicap to the smaller nations. We must look out for Japan and China and see that English does not crowd out Esperanto.

Mr. Morton spoke of his trip to Montreal and the possibility of a congress at Montreal next summer, and read a poem in honor of Dr. Zamenhof.

Mr. Powell spoke of "Japan Salesman," which has two or three pages of Esperanto propaganda. He sent copies to Board of Foreign Commerce. He also spoke of Dr. Page's "League of Nations," and of the possibility of publishing Dr. Zamenhof's manuscript.

As was said at the last memorial meeting for Dr. Zamenhof in

Dr. Grant's church, the best way to show our appreciation and devotion is to keep his memory alive by doing something for the movement.

Prof. Fred S. Webster, the famous naturalist, spoke.

At the Boston meeting of greeting to the Bahai, Dec. 31, 1918, Capt. Postnikov spoke about as follows:

"I consider it the highest pleasure and honor for me to be invited to deliver an address about "Esperanto" before the members of the Bahai Association.

"Never in its history was the International Language so strongly endorsed and appreciated by any religion as by Bahaists. The reason why, lies in the fact that on the one hand the Bahai religion is more than international; it is the only religion which recognizes and includes all religions with the aim to elevate and better the life of all mankind, of all religions; it is **superreligious**. On the other hand, "Esperanto" is not only an international language, it is above all the prejudices of the national languages; it recognizes other languages and includes everything that any national language may contribute to the future universal language; it is **supernational**.

Both are closely inter-related and practically inseparable because the final triumph of the Bahai movement is impossible without the use of one universal language, which will enable one to clearly and amicably discuss and settle numerous questions between Bahai speaking different languages and belonging to different races. Again the very existence of Esperanto, its spreading and strength was, is, and ever will be dependent upon that spirit of world brotherhood, mutual international respect and religious devotion to the great Cause which is so loftily interpreted and exemplified in the Bahai movement."

Then Capt. Postnikov told of his meeting Dr. Zamenhof and went on to urge the use of Esperanto on all occasions even to the exclusion of the national speech. Mr. Morton dissented somewhat on our abandoning our native tongue—as well he might. We were glad to hear of the activity in Montreal. Mr. Lee outlined his work on propaganda and announced a program for the following courses: 1. For Bahai and friends at the Flexners' in Brookline Tuesday evenings; 2. For Bahai and friends at the Obers' in Cambridge Saturday evenings; 3. For beginners—all welcome—at the clubroom Tuesday evenings; 4. Translation into Esperanto, for advanced students at the Paysons', day and hour to be arranged.

January 17 the New York Esperanto Society tendered a farewell reception to Mr. Richard Carter, who is returning to England. Lieutenant Camp, D. A. Klajn, Mr. Silbernik, and others, spoke.

Science, Dec. 6, 1918, has a note by J. D. Hailman on "Usono."

In the Kablegram, Nov.-Dec., 1918, the Rotarian gives us a good word.

Chicago Tribune, during the first two weeks of December had three articles on Esperanto, under Voice of the People.

Detroiter Abendpost, Dec. 25, 1918, translated in full into German Mr. Page's article on the League of Nations and Esperanto.

Perth Amboy News, Jan. 14, 1919, gives its leading editorial to advocating Esperanto.

